fissato un segno costante per l'articolo da premettersi, quando si voglia rendere il loro senso più determinato, io mi farei prima di tutto a stabilire un carattere pei nomi delle classi più generali, come *animale*, *vegetabile*, *minerale*, ec.: verrei quindi a stabilirne degli altri per le classi, che sotto a queste comprendonsi come *quadrupede*, *augello*, *pesce*, *rettile*, *insetto*, *pianta* , *fiore*, *frutto*, *erba*, *legume*, *metallo*, *pietra*, *sale*, *acqua*, *terra*, ec. Altri caratteri fisserei per esprimere monte, fiume, mare, lago; regno, provincia, città, villa; altri per significare *anima*, *cor*[*p*]*o*, e quindi *facoltà dell'anima*, *virtù*, *vizj*, *passioni*, *membra corporee*; altri per indicare *arte*, *scienza*, *professione*, *dignità*, ec.

kategori-klasigan litersignon, por bone determini la kategorian apartenon de substantivo. Oni ĝin metas antaŭ la litersigna ideogramo. Ĝi ebligas tuj percepti la gramatikan klason en kiu troviĝas la koncerna nocio. Tion farinte, mi unue elektus literon utiligotan por specife indiki la plej ĝeneralajn nocio-subklasojn, kiel *besto*, *vegetaĵo*, *mineralo*, ktp. Poste, per aliaj literoj, mi kreus kromajn subklasojn, kiuj estas distingeblaj interne de la bazaj klasoj: ekzemple: *kvarpiedulo*, *birdo*, *fiŝo*, *reptilio*, *insekto*, *planto*, *floro*, *frukto*, *herbo*, *legomo*, *metalo*, *ŝtono*, *salo*, akvo, tero, ktp. Per aliaj literoj mi indikus *monton*, *riveron*, *maron*, *lagon*, *regnon*, *provincon*, *urbon*, *vilaĝon*. Sed ankaŭ *animon*, *korpon*, kaj tial *animkapablojn*, *virton*, *malvirton*, *pasion*, *korpopartojn*. Per alia litero, eblus indiki *arton*, *sciencon*, *profesion*, *oficon*, ktp.

È incredibile l'utilità, che dalla fissazione di questi caratteri noi potremmo raccogliere. Perciocché, in primo luogo io vorrei, che ad ogni individuo si premettesse allora immedia[ta]mente il nome della classe, nella quale egli si contiene, come a *cervo* quel di *quadrupedi*, a *falcone* quello d'*augello*, a' *pino* quello di *pianta*, ec. In tal modo due vantaggi s'avrebbono: l'uno che conosciuto il carattere dell'individuo, si vedrebbe anche quello della classe, a cui egli appartiene, i generi delle cose sarebber meglio, e più uniformemente determinati; l'altro, che non conosciuto il carattere dell'individuo, si conoscerebbe almen quello della sua classe, e facilmente dal contesto anche il primo spesse volte potrebbesi indovinare senza ricorrere al dizionario.

Estas mirige rimarki, kiom multe ni povus profiti per la utiligo de tiuj kategoriaj-indikaj litersignoj. Pro tio, mi emus, ke al ĉiu individua speci-nomo oni aldonu la indikilon de la klaso, al kiu la nomo mem apartenas: al la nomo *cervo* oni antaŭskribu la indikon de la *kvarpiedula* klaso, al *falko*, tiun de la *birda klaso*, al *pino* tiun de la *arbo-klaso.* Tiamaniere, ni havus du avantaĝojn. Jen la unua: ni vidus la karakterizilon de la vorto. Tra ĝi, ni tuj komprenus, al kiu klaso la vorto apartenas. Per tio, la ĝenerala signifo de la vorto estus klara al la leganto. Se ni ne komprenas la signifon de substantivo indikanta la individuon, ni almenaŭ konas la karakterizan indikilon de lia klasaparteno. La kunteksto povas helpi kompreni la signifon, sen ke ni devige malfermu la vortaron.

In secondo luogo, per tutti i nomi proprj sarebbe inutile d'inventare caratteri particolari; ma premesso il carattere della classe, sotto alla quale egli è compreso, non s'avrebbe che a scrivete il nome medesimo distesamente; così avendo a nominare *Assiria*, *Ninive*, *Sardanapalo*, basterebbe ai caratteri di regno, di città, e di rescrivere in seguito per disteso i nomi medesimi *Assiria*, *Ninive*, *Sardanapalo*.

Jen la dua avantaĝo. Se ni frontas personajn nomojn, ni ne devas inventi karakterizajn individuajn nomojn por ĉiu unuopa persona nomo trovota. Sufiĉas koni la kategori-klasigan litergrupon, kaj apud (aŭ post) ĝi oni skribu la koncernan personan nomon. Se ni devas mencii la nomojn *Asirio*, *Ninivo*, *Sardanapalo*, sufiĉus unue skribi la kategori-klasigajn litersignojn de regno, de urbo kaj de reĝo. Tiam, oni skribu,

Il Sig. KALMAR ben vedendo egli pure, che l'inventare per ogni nome proprio un particolare carattere, sarebbe stata una briga e inutile, e infinita, ha cercato di risparmiarla.

respektive, la nomojn mem: *Asirio*, *Ninivo*, *Sardanapalo*. Eĉ Kalmár komprenis tion, kaj evitis la inventon de komplikaj "litersignoj" por personaj nomoj, per la rimedo, kiun mi ĵus priskribis. Sed tion li aplikis nur al la familinomoj.

Ma i soli nomi di famiglia vuol egli che scrivansi per disteso; agli altri sostituisce alcune sue abbreviature, le quali invece di togliere, possono spesse volte concorrere ad accrescere la difficoltà. E chi è infatti, che vedendo la sua abbreviatura *Gg*. possa argomentare s'ella significhi piuttosto *Giorgio*, o *Gregorio*? e vedendo *An*, debba conoscere ch'ella vuol dire *Angleterre*, o *Inghilterra*, e non piuttosto *Anversa*, *Ancona* o *Annec*[*y*] o *Anspach*, o che so io? Lo stesso io farei con tutti i nomi di metafisica, di fisica, di botanica, di medicina, di notomia, di matematica, ec, con tutti insomma quei nomi tecnici, e scientifici, che alla più parte delle lingue sono comuni.

Sed tio validas nur por familiaj nomoj, ne por normalaj propraj nomoj. Li preskribis, ke oni ilin skribu per mallongigoj, sed tio ne solvas tiun problemecan situacion. Kontraŭe, ĝi povas eĉ komplikigi ĝin. Jen: vi legas la mallongigon *Gg*. Ĉu ĝi signifas *Giorgio*, aŭ *Gregorio*? Kaj kion signifas la mallongigo *An*? Ĉu *Angleterre* (aŭ *Anglio*), aŭ ĉu eble *Antverpeno*, *Ancona*, *Annecy*, aŭ *Anspach*? La saman sistemon ni do apliku al ĉiuj terminoj de metafiziko, fiziko, botaniko, medicino, anatomio, matematiko, ktp, t.e. al ĉiuj teknikaj kaj sciencaj terminoj, kiuj ekzistas en multegaj lingvoj.

Ciò fatto, non rimarrebbero che quelle cose, le quali hanno in ciascuna lingua un diverso nome, da doversi contrassegnare con un distinto carattere. Ma anche rispetto a queste il numero dei caratteri distintivi con un metodo semplicissimo può ridursi ad assai meno della metà. Quasi ogni nome ha il suo contrario, il quale esprime o negazione, od opposizione, come *luce* e *tenebre*, *giorno* e *notte*, *moto* e *quiete*, *vita* e *morte*, *amore* e *odio*, ec.

El nia tuta vortaro, restas nur tiuj nocioj, kiuj esprimiĝas per malsamaj terminoj en la malsamaj lingvoj. Ili aperus en la nova lingvo, kiel specifaj vortoj. Sed eblas ja limigi la nombron de tiaj vortoj, per tre simpla metodo. Preskaŭ ĉiu koncepto (nocio) havas sian malon, kiu prezentiĝas ĉu per neado, ĉu per kontraŭo. Kiel inter *lumo* kaj *mallumo*, *tago* kaj *nokto*, *movo* kaj *kvieto*, *vivo* kaj *morto*, *amo* kaj *malamo*, ktp. Ni povas elpensi du specialajn signojn.

Ora stabiliti due segni, uno esprimente negazione, e l'altro opposizione, basterà inventare i distinti caratteri per le sole idee positive, perciocché le negative e le contrarie dagli stessi caratteri, aggiuntivi i segni costanti di negazione e d'opposizione, verran espresse bastantemente; così le *tenebre*, s'esprimeranno col carattere della *luce* messovi il segno negativo, l'*odio* s'esprimerà con quel dell'*amore* aggiuntovi il segno opposto. Questo artifizio non è sfuggito al Sig. KALMAR; se non che la mutilazione del carattere positivo, con cui vuol egli che s'accenni l'idea negativa, o contraria, troppo spesso potrebbe dar luogo ad

Unu esprimas neadon, la alia esprimas kontraŭon. Sufiĉus, do, inventi la specifajn litersignojn *nur* por la pozitivaj konceptoj, ĉar la neadaj kaj kontraŭaj konceptoj, en konekto kun la pozitiva termino, konstruiĝos, kiel nova termino. La koncepto *mallumo* aperos dank-al la kunmeto de la termino indikanta *lumon*, kun la signo indikanta *neadon*; la koncepto *malamo* konstruiĝos dank-al la kunmeto de la signo indikanta *kontraŭon*, kaj de la termino indikanta *amon*. Tion aplikis ankaŭ Kalmár, sed li eltiris la neadan aŭ la kontraŭan noci-terminojn el la pozitivaj terminoj, fortranĉante parteton de la ikoneca litero, kiu konsistigas la vorton. Sed tio

incertezze, e ad errori.

povas kaŭzi malcerton, aŭ erarojn.

Anche le cose, che hanno fra loro le relazioni o di somiglianza, o di coesistenza, o di dipendenza potranno significarsi con uno stesso carattere, aggiuntovi un segno costante: ma in questa parte io vorrei essere più parco del Sig. KALMAR, affinché il soverchio amore delle allusioni non mi guidasse all'ambiguità, ed agli equivoci.

Eĉ nocioj, rilatantaj al komuna simileco, aŭ al kunesto, aŭ al dependo rilate bazan nocion, povus esprimiĝi per ia tia speciala "konstanta signo", kiu aldoniĝas al la baza nocio. Sed tion mi dezirus limigi, ĉar troa emo al neklare analizeblaj senco-familioj riskus konduki min al ambiguaĵoj kaj al miskomprenoj.

Dove porrei uno studio principale sarebbe nel determinare il senso preciso di ogni nome, e le idee precise ch'egli contiene. Ogni lingua è piena di termini vaghi, che o s'adoprano senza annettervi niuna idea determinata, o indistintamente si usano ad esprimere una medesima idea.

Mia plej grava tasko estus la preciza determino de la signifo de ĉiu nocio, kun la precizaj nuancoj, kiuj en tiu nocio en-estas. En ĉiu lingvo abundas terminoj malprecizaj, kiujn oni ofte mis-utiligas sen klara distingemo. Ofte oni utiligas ilin, kvazaŭ ili estus samsencaj.

Ora da una lingua caratteristica (1) tutti i veri sinonimi debbon essere esclusi assolutamente; (2) tutti quei termini, che comunemente s'adoprano come sinonimi, ma che sebbene esprimano in grande la medesima idea, si distinguano però per qualche piccola differenza, o *nuance*, come dicono i Francesi, dopo averne determinato il senso con tutta precisione, significare dovrebbonsi collo stesso carattere principale, aggiuntivi i segni opportuni che li distinguessero. In questo modo oltreché verrebbe a scemarsi di molto il numero dei caratteri, si darebbe alla lingua quel grado di esattezza, e di precisione, di cui tutte mancano più o meno.

Nu: en lingvo kun klasiga celo (1) ĉiuj *veraj* sinonimoj devas tutcerte foresti; (2) la terminoj, preskaŭ samaj, kiuj ofte uziĝas *kvazaŭ* sinonime, sed en kiuj aperas ankaŭ nur eta nuanca diferenco, devus esti analizataj kun granda precizeco. Kaj la nuancoj devus separite aldoniĝi al la ĉefnocio per kromsignoj. Tio faciligas ja distingi la nuancojn. Tio ebligus malpliigi la nombron de ikonecaj literoj, sed samtempe redonus al la lingvo gradon de ekzakteco kaj de precizeco, kiu ĝenerale ne troviĝas en la etnaj lingvoj.

E non sarebbe pur molto difficile il riuscire a questa esatta determinazione. In una lingua di già formata, qual è, a cagion d'esempio, l'Italiana, il volere precisamente fissare il senso di ogni nome, sarebbe impresa difficilissima, perciocché non è in arbitrio del filosofo il dargli un significato piuttosto che un altro, convien ch'egli rispetti la prepotente forza dell'uso.

Distingi tiujn nuancojn, principe, ne estas afero malfacila. Ekzemple, en lingvo etna, kia estas la itala, estus tre malfacile detale fiksi ĉiujn signifojn kaj nuancojn, ĉar ne estas tasko de filozofo trudi jenan signifon, anstataŭ alian. La sinteno de filozofo estas ja alispeca, nome la respekto de la graveco de la tradicia lingvo-uzo.

Che norma è del parlare, arbitro, e giudice, e che nel tempo stesso è sovente vario, o incerto, ed anche talvolta contraddittorio. Ma nella formazione di una nuova lingua la determinazione dei segni tutta dipende

La sperto instruas, ke la parolo de juĝantoj kaj de juĝistoj estas ofte plursenca, aŭ malklara. Kelkfoje, eĉ sinkontraŭdira. Sed en la kreo de la nova lingvo, la senco-fiksigo de la ikonecaj litersignoj dependas ekskluzive de la lingvo-

dall’autore, ed altro egli non ha a fare, che una diligente analisi delle idee per esaminare quali richieggano un segno distinto, e quali no, nel che le meditazioni dei più celebri metafisici, e una mezzana perizia delle lingue più colte gli sarebbono d’un soccorso grandissimo.

aŭtoro, kiu devas efektivigi akuratan analizon de la nocioj, por kompreni, kie ekzistas (aŭ ne ekzistas) ankaŭ nur minimuma senco-nuanco. Por tion atingi, al li estus tre utile koni la verkojn de plej famaj metafizikistoj, kaj havi ioman spertecon pri la uzo de la lingvoj de la plej kleraj popoloj.

Fissati i caratteri dei sostantivi, la fatica maggiore sarebbe compiuta; conciossiaché tutti gli *aggettivi*, che dai sostantivi derivano, come *celeste*, *terrestre*, *marino*, *lucido*, *tenebroso*, ec. coi caratteri de’ sostantivi medesimi agevolmente si verrebbono a significare, aggiuntovi solamente un segno costante, che l’aggettivo indicasse. Vero è, che all’opposto vi sono moltissimi sostantivi, che dagli aggettivi discendono, come *grandezza*, *piccolezza*, *molestia*, *allegrezza*, ec.; e in questo caso parrebbe, che il carattere semplice avesse ad accennar l’aggettivo, e che il segno costante dovesse aggiugnersi invece al sostantivo da lui derivato.

La fiksigo de la ikonecaj litersignoj por la substantivoj estas la plej grava laboro. El la substantivoj naskiĝas la *adjektivoj*, kiaj *ĉiela*, *tera*, *mara*, *brila*, *tenebra*, ktp. Sur la bazo de la substativaj terminoj, oni nur aldonos “konstantan funkcian signon”, indikanta transiron al la adjektiva funkcio. Estas fakto, ke ekzistas, tamen, substantivoj kiuj venas el adjektivoj, kiel *grandeco*, *malgrandeco*, *ĝeno*, *ĝojo*, ktp. Ĉi tie, la vojo devus esti inversa: de adjektivo al substantivo, kiel indikite, per speciala afikso (aŭ “konstanta signo”).

Ma in una lingua caratteristica dee badarsi più alla natura del vocabolo, che alla sua origine, la quale è varia in varie lingue; e dipende più dal caso, e dal capriccio dei primi istitutori che da tutt’altro. Il carattere semplice adunque, fuor di quei casi, che richieggano un’assoluta eccezione, dovrà esprimere sempre il sostantivo; e gli aggettivi o nascano dai sostantivi, o li producano, dovranno tutti esser marcati dal segno costante, sicché alla sola prima ispezione ravvisar tosto si possa qual carattere un sostantivo contenga, e quale un aggettivo.

Sed en kategori-klasiga (“filozofia”) lingvo estas pli utile atenti pri la signifo de la vortoj, ol atenti pri ilia origino, kiu, cetere, varias laŭ la lingvo pristudata. La origino de la terminoj, en nacia lingvo, dependas de ĝia historio. En artlingvo, la baza termino estas la substantiva formo de la nocio, kvankam, eble, povus ekzisti kelkaj tre maloftaj esceptoj. Kiel ajn formiĝas la substantivoj kaj la adjektivoj, el kiu ajn fonto ili venas, ili devas montri la karakterizan klasigan litersignon de sia kategorio, tiel ke oni povu tuj rekoni ilian kategorian apartenon: ĉu substantiveca, ĉu adjektiveca.

A significare i *comparativi* noi usiamo di premettere al nome gli avverbj *più* e *meno*, e i Francesi colla premessa della particella *très* esprimon anche i *superlativi*, siccome i *diminutivi*, e gli *aumentativi* significano cogli aggettivi *petit* e *grand* quando scemar si deve, ed accrescere il valore d’un sostantivo, e cogli avverbj *peu* e *beaucoup*, quando ciò s'ha a fare con un aggettivo. Egli è adunque chiarissimo l'artificio, con cui le medesime cose anche in una lingua caratteristica agevolmente potranno

Por indiki la *komparajn* formojn, ĝenerale ni antaŭmetas al la termino la adverbojn *pli* kaj *malpli.* En la franca lingvo, la vorteto *très* esprimas ankaŭ la superlativojn. Analoge, la et-formoj, kaj la eg-formoj *indikiĝas* per la adjektivoj *petit* kaj *grand*, kiam ni volas esprimi malgrandigon, respektive grandigon de substantivo. Analoge, per la adverboj *malmulte* kaj *multe*, kiam temas pri adjektivoj. Tio montras tre klare, ke tion oni povas fari ankaŭ en kategori-klasiga lingvo, per la samaj rimedoj.

distinguersi.

Più non rimane a cercare rispetto ai nomi, che la distinzione dei *generi*, e dei *numeri*. Circa a questi un segno costante, che indichi il plurale, potrà bastare; conciosiaché tutti i nomi, che non l'avranno, si vedrà tosto dover essere singolari. Una piccola modificazione del medesimo segno potrebbe anche adoperarsi ad esprimere il quale dei Greci, e degli Ebrei, sebbene essendo egli non di molto uso[24], potrà ommettersi comodamente, siccome gli mancava difatti senza alcuno sconcio alla lingua latina, e manca attualmente alle più colte fra le lingue moderne.

Restas lasta tasko. Kiel indiki, ĉe substantivoj, la *genrojn*, kaj la *unu-* aŭ *la plur-nombrecon*? Koncerne la pluralon, sufiĉus krei "konstantan signon", kiu indikas ĝin. La terminoj, kie tiu signo forestas, estas evidente ununombraj. Eta modifo de tiu konstanta signo povus eventuale servi al la indiko de jena speciala pluralo[24], kiun ni trovas en la greka kaj en la hebrea lingvoj. Ĝi ne estas tre uzata. Eblus ĝin komforte tute forlasi, ĉar ĝi ne ekzistis en la latina lingvo, kiu, pro tio, ne suferis specialan damaĝon. Krome, ĝi forestas, hodiaŭ, el la plej klere uzataj modernaj lingvoj.

Quanto ai generi ognuno sa, che la distinzione di sesso non trovasi se non nei corpi organizzati, cioè negli animali e nelle piante. Ma nel discorso comune gli animali soltanto son quelli, in cui occorre d'aver il maschio a distinguere dalla femmina. In questi soli pertanto s'avrà da usare la distinzione di genere, e a ciò basteranno due segni costanti, uno de' quali il maschile significhi, e l'altro il femminile. Fuori degli animali, ogni altro nome sarà del genere neutro, cioè di nessuno, e non dovrà avere per conseguenza alcun segno; dal che un vantaggio pur ne verrà, che i nomi marcati da' segni generici indicheranno tosto un animale.

Koncerne la genrojn, indas memori, ke la sekson ni trovas nur en la biologie organizitaj korpoj, t.e. ĉe la bestoj kaj ĉe la plantoj. Sed ĉe la ĝenerala publiko, gravas nur la distingo inter in- kaj vir-vivaĵo. Nur en tiu kazo oportunas distingi la in-vivaĵon disde la vir-vivaĵo. Nur ĉi tie ni utiligos genran distingilon. Por tion fari, sufiĉus havi *du* konstantajn signojn. Unu indikas la vir-genron, la dua indikas la in-genron. Tio utilas nur en la mondo de la animaloj. En aliaj kuntekstoj, la nomo estas genre neŭtrala, kaj tial ĝi ricevos nek la unuan, nek la duan konstantan signon. El tio venas avantaĝo: termino, kun unu el la du konstantaj signoj, indikas devige vivantan estaĵon.

Circa agli aggettivi, egli è inutile l'avvertire, che siccome hann' essi a prendere tutte le modificazioni de' sostantivi, a cui appartengono; così dovranno portare il segno del genere, o del numero proprio del lor sostantivo, e andarne senza, allorché questo non n'abbia.

Rilate la adjektivojn: ili devas akordiĝi kun la akompanata substantivo. Tial ili akiras la konstantan genro-signon. Se al la substantivo mankas genro-signo, ankaŭ la adjektivo(j) tion malhavas.

Gli *avverbj* equivalgono tutti di lor natura ad una proposizione, e ad uno o più nomi: così *dolcemente* significa con dolcezza, *brevemente* con brevità, *facilmente* con facilità, ec. Ora fissati i caratteri per gli avverbj più generali nella maniera sovraccennata, per tutti gli altri non sarà egli bastante l'usare il carattere stesso

La funkcio de la *adverboj* similas al la funkcio de propozicio, kun unu aŭ pluraj substantivoj: *dolĉe* signifas *kun dolĉeco*, *mallonge* signifas *kun mallongeco*, kaj *facile* - *kun facileco*, ktp. Plej ofte ni povas transformi substantivojn al adverboj, en la supre indikita maniero. Por la ceteraj adverboj, sufiĉus utiligi la substantivon,

[24] Si tratta del *duale*, un "plurale" organico (le due braccia, i due occhi).

[24] *Temas pri la* dualo*, speco de "pluralo" organika (la du brakoj, la du okuloj).*

de’ sostantivi, cui essi contengono, aggiuntovi un segno costante, il qual dimostri l’avverbio?

de kiu ili devenas, kaj al ĝi aldoni specialan konstantan signon, indikanta ilian adverbecon.

I *verbi*, che da’ sostantivi derivano, o che lor danno origine, sono pure moltissimi. Or questi pure senza l’invenzione di nuovi caratteri è manifesto, che con quelli de’ sostantivi corrispondenti chiarissimamente potranno esprimersi colla sola giunta d’un segno costante, che indichi il verbo.

Verboj, kiuj venas el-de substantivoj, aŭ el kiuj venas substantivoj, estas multegaj. Ne estas necese inventi novajn specialajn vortojn, ĉar eblas ilin konstrui per la simpla aldono de la konstanta signo indikanta ilian verbecon.

Ma questi segni in primo luogo avranno ad essere tre diversi; uno pei verbi transitivi attivi, un altro pei transitivi passivi, e. un terzo per gl’intransitivi, o neutri. In secondo luogo il carattere solo col solo segno verbale non potrà accennare che l’indefinito; d’altri segni sarà dunque mestieri per indicare le diverse persone, i diversi tempi, i diversi modi de’ verbi.

Unue, tamen, tiuj signoj devas ebligi triopan distingon: inter aktivaj, pasivaj kaj netransitivaj verbotipoj. Due, verbo, kiu montras nur la konstantan verbo-signon, havas nur nedifinitan funkcion. Tial, iĝas necesa la kreo de kromaj konstantaj signoj, por indiki la verbo-personojn, la tensojn, kaj la modalecojn de la verba konjugacio.

Ma quanto alle persone basterà premettervi i caratteri de’ nomi personali; quanto ai tempi quelli degli avverbj di tempo; e quanto ai modi, oltreché abbastanza per lo più verranno indicati dal senso, potrà esprimersi l’ottativo coll’interjezione di desiderio, l’imperativo, e il soggiuntivo con due segni costanti; e fissati questi, l’indicativo si farà noto abbastanza dall’aver i nomi personali senza alcun segno modale, e l’indefinito dal non avere neppure la distinzione de’ numeri, e delle persone

Koncerne la verbopersonojn, sufiĉus antaŭmeti la korektan konstantan pronom-signon. La verbaj tensoj esprimiĝu per la tempaj adverboj, la modalecojn oni ja komprenas el la kunteksto, kaj la dezir-tenso per la dezir-interjekcio, la u-tenso, kaj la nerekta parolo esprimiĝas per similfunkcia konstanta signo. La indikativo evidentiĝos de si mem, dank-al la foresto de modalaj signoj, kaj la nedifinita formo evidentiĝas per la nedistingo de nombro kaj personoj.

Un altro segno costante sarà necessario per ultimo alla significazione de’ *participj*, de’ quali io vorrei, che uno si stabilisse per ogni tempo alla maniera de’ Greci; al che però non si chiederebbe che aggiugnervi gli avverbj di tempo. I *gerundj* dalla nostra lingua verranno esclusi di lor natura; perciocché i gerundj italiani equivalgono ai participj latini, e greci; così il nostro *amando* è l’*amans* de’ Latini, e l’*avendo amato* è il φιλησας (*phileesas*) de’ Greci, e i gerundj latini ottimamente s’esprimono coll’indefinito preceduto dalle preposizioni corrispondenti , come *amandi* di amare, *in amando* nell’amare, *ad amandum* ad amare: colle quali preposizioni aggiunte agl’indefiniti esprimendosi egualmente anche *i*

Finfine, kroma konstanta signo estas necesa, por konstrui la *participojn*. Mi proponus, ke ekzistu participoj por ĉiu tenso, kiel en la greka lingvo. Eblus, tamen, havi nur unu, kaj al ĝi aldoni temp-adverbojn. La *gerundivaj* formoj ne trovus lokon en nia lingvo, ĉar la itallingvaj gerundivoj korespondas al la latinaj kaj grekaj participoj. *Amando* (en esperanto: *amante*) korespondas al la latina *amans* (*amanta*), kaj *avendo amato* (en esperanto: *aminte*), korespondas al la greka φιλησας (*phileesas*). La latinaj *gerundivoj* esprimiĝas tre oportune dank-al prepozicioj, kiuj antaŭiras la nedifinitan verban formon. Tiel: *amandi* (*di amare*; *de amo*), *in amando* (*nell’amare*; *en amo*), *ad amandum* (*ad amare*; *amenda*, *aminda*). Per tiuj prepozicioj eblas

supini, questi pure verranno tolti.

Eccovi dunque in compendio tutta la lingua. Stabiliti prima que' pochi caratteri, che si richieggono per accennare i *pronomi*, le *preposizioni*, le *congiunzioni*, le *interjezioni*, e gli *avverbj più generali*, fatevi a determinare i caratteri pei *nomi sostantivi* incominciando da' più universali. Istituiti questi, tutti i *nomi proprj*, e tutti i *tecnici* e *scientifici*, che in quasi tutte le lingue sono uniformi, vi risparmieranno la briga d'inventare per essi de' caratteri particolari, perciocché si contenteranno d' essere scritti distesamente, preceduti soltanto dal carattere della classe a cui appartengono.

Rimarran solo a fissare i caratteri per quei nomi, che nelle varie lingue son varj, e circa a questi puranche i segni di negazione, di opposizione, di simiglianza, di coesistenza, di causa, di effetto vi solleveranno dalla fatica più oltre della metà. Inventati poi i caratteri de' sostantivi, voi potrete riguardare il lavoro siccome quasi compiuto, perciocché non avrete quasi a far altro, che a determinare quattro segni costanti da aggiugner loro per formare gli *aggettivi*, gli *avverbj*, i *verbi* e i *participj*.

Quanto alla *sintassi* io non credo mestieri d'affaticarsi ad immaginare niuna regola nuova. Voi avrete la distinzione de' sostantivi, e degli aggettivi, e in essi quella di genere, e di numero; avrete ne' verbi la distinzione di persona, di numero, di tempo, di modo; avrete le preposizioni da premettere a' nomi secondo le relazioni, che avranno ad altri nomi, o ai verbi. La vostra lingua caratteristica avrà dunque tutto ciò che bisogna, onde valervi della sintassi, che presso agl'Italiani, a' Francesi, agl'Inglesi, e agli Spagnuoli si tiene.

Se or mi chiedete di qual forma avranno ad essere i caratteri, di questo pure io v'appagherò facilmente. Io amerei che i caratteri esprimenti le cose fisiche fossero per quanto è possibile

ankaŭ konstrui la *supinajn* formojn, kiuj, tial, ne ricevos specialan gramatikan formon.

Jen, do, en rapida supervido, la resuma skemo de la lingvo. Komence, oni kreos la malmultajn terminojn, necesajn por enkategoriigi la *pronomojn*, la *prepoziciojn*, la *konjukciojn*, la *interjekciojn* kaj la *plej komunajn adverbojn*. Poste, ni okupiĝis pri la klasiga prefikso (karakterizilo) de la *substantivoj*. Ni tion faris, komencante je la plej universalaj kategorioj. Poste, ni alfrontis la *nomojn proprajn*, kaj la *sciencajn terminojn*, tre similaj en la plej granda parto de la lingvoj. Tio ŝparigos la nombron de specialaj karakteriziloj kaj terminoj, ĉar sufiĉus ilin skribi tiaj, kiel ni jam faras kutime, tamen kun klasigila prefikso, kiu indikas la kategorian apartenon.

Poste, ni kreos la ideogramecajn litertipojn por tiuj nomoj, kiuj en la diversaj lingvoj troviĝas sub malsamaj formoj. Ni povas duonigi ties kvanton, per specialaj signoj, indikantaj neadon, kontraŭecon, similon, kun-ekziston, kaŭzon, efekton. Kiam ĉio tia estos elpensita, via laboro estos ĉe sia fino. Al vi restos praktike nenio alia, ol fiksigi kvar konstantajn signojn, aldonotajn al la kreitaj vortoj, por formi *adjektivojn*, *adverbojn*, *verbojn* kaj *participojn*.

Koncerne la *sintakson*, laŭ mi, estus tede inventi novajn regulojn. Vi distingas inter substantivoj kaj adjektivoj, kaj en tiu distingo vi konas la subdistingojn laŭ genro kaj nombro. En la verboj, vi kapablas distingi la personon, nombron, tenson, modalon. Vi konas la prepoziciojn, kiuj antaŭiras la nomojn sur la bazo de la rilato, kiun tiu lasta havas kun iu nocio, aŭ kun la verbo. Via kategori-klasiga lingvo jen posedas ĉiujn trajtojn, kiujn ĝi bezonas, por ke oni utiligu ĝin, se vi konas la sintaksajn regulojn de la franca, angla, hispana lingvoj.

Vi certe demandos min pri la aspekto de la menciitaj ikonoj. Mi proponus, ke la bildaj ideogramoj esprimantaj fizikajn aspektojn, estu kiel eble plej aspekto-similaj. Do la *suno*, la

imitativi. Quindi il *sole*, la *luna*, le *stelle*, i *raggi della luce*, la *fiamma*, un *monte*, un *fiume*, un'*erba*, una *pianta*, un *fiore*, un *frutto*, una *foglia*, un *composto*, una *squadra*, uno *scarpello*, un *martello*, un *globo*, un *cubo*, un *quadrato*, un *rettangolo*, un *triangolo*, un *cerchio*, una *testa*, un *braccio*, una *mano*, un *piede*, ec. tutti vorrei espressi colle figure corrispondenti.

luno, la *steloj*, la *lum-radioj*, la *flamo*, *monto*, *rivero*, *herbo*, *planto*, *floro*, *frukto*, *folio*, *infloresko*, *ortangulilo*, *ĉizilo*, *martelo*, *globo*, *kubo*, *kvadrato*, *rektangulo*, *triangulo*, *cirklo*, *kapo*, *brako*, *mano*, *piedo*, ktp., ĉiuj reprezentiĝos per la koresponda bildo (ikono).

La facilità, con cui il loro significato a prima vista s'intenderebbe, è troppo chiara e sensibile, e un comodo vi ha eziandio, che per moltissimi di questi oggetti già belle e pronte voi trovereste presso agli Stampatori le forme senza la briga di fabbricarle di nuovo.

Tio faciligus la rekonon kaj la memoron de la signifo de la unuopaj vortoj. Krome, tiujn ikonojn vi jam trovus pretaj ĉe la presistoj, kaj ne estus necese ilin fabriki nove.

Per gli altri nomi io mi varrei delle lettere dell'alfabeto, e son certo, che n'avrei maggior copia, che non bisogna. Perciocché il solo alfabeto comune me ne fornirebbe 46 tonde fra majuscole e minuscole, e altrettante corsive, a cui aggiugnendo le lettere moltiplici, come ſ s; i j; u v; le raddoppiate come ff, ss, le composte come ſs, &, le abbreviature come Ł, ꝶ, ec. ec., e ciò tanto nei caratteri tondi, che ne' corsivi, n'avrei già oltre a cento. Questo numero mi si verrebbe a raddoppiare, e triplicare usando caratteri, di diversa grandezza, come il canoncino[25] **a**, il "testo" a, e il garamoncino[26] a, che difficilmente si possono confondere. Se ciò non bastasse, ricorrerei per ultimo agli alfabeti Greco, Ebraico, Tedesco, Arabico, ec. sicuro che non avrei pur mestieri d'esaurirli.

Rilate la ceterajn terminojn, laŭ mi, ni uzu la alfabetajn literojn. Tute certe, ili plene sufiĉos al via celo. Fakte, nia komuna aboco enhavas jam 45 literojn, majusklajn kaj minusklajn. Vi povas aldoni la kursivajn. Krome ekzistas ankaŭ la duformaj literoj, kiaj ſ s; i j; u v, la duoblaj literoj, kiaj ff, ss, la kunmetitaj, kiaj ſs, &, kaj la mallongigoj, kiaj Ł, ꝶ, ktp. Ili estas haveblaj kaj en kursiva, kaj en ronda formoj. Do, pli ol cent malsamaj literoj. Tiu kvanto povus duobliĝi aŭ triobliĝi, se oni utiligus ankaŭ la diketan[25] **a**, la normtekstan a kaj la garamondetan[26] a . Tiuj litertipoj malfacile konfuzigas onin. Se tio ne sufiĉus, mi fine ĉerpus el la alfabetoj greka, hebrea, germana, araba, ktp. Sed mi certas, ke mi ne elĉerpos tiujn alfabetojn.

Quanto a' segni costanti, l'apostrofo, i varj accenti, il punto con cui gl'inglesi esprimono le quantità fluenti, la linea o semplice, a doppia posta sovra ai caratteri, di cui si valgono i Matematici per indicate i minuti primi e secondi, e le varie quantità d'una stessa denominazione, i numeri posti in alto, con cui s'accennano in algebra le potenze, e tanti altri

Koncerne la konstantajn signojn, mi pensis pri la apostrofo, pri la diversaj skrib-akcentoj, pri la punkto per kiu la angloj indikas la fluantajn kvantojn, pri la linio foje simpla, foje duobla, metita super la signoj, utiligata far-de la matematikistoj por indiki la minutojn kaj la sekundojn, kaj pri la diversaj denominatoroj super la sama numeratoro, pri la numeroj

[25] Tipo di carattere di un numero di punti maggiore che non il carattere usuale per il testo. Anche il grassetto funzionerebbe.

[25] *Tipografia karaktero, pli granda ol la entekste utiligita karaktero. Eventuale ankaŭ la grasetaj pres-literoj.*

[26] Carattere tipografico di nove punti, molto piccolo.

[26] *Naŭpunkta tipografia karaktero. Tre malgranda.*

ve ne fornirebbono certo abbondantemente.

Non riman più che accennar la maniera, con cui i caratteri si hanno a disporre; e in questo io vorrei, che affine di evitare ogni confusione, in quella guisa che ogni parola si scrive staccata, cosi staccato si scrivesse ogni carattere ad essa corrispondente. Non s'avrebber dunque a congiungere se non i caratteri dei nomi universali, che ho detto innanzi doversi premettere ai nomi proprj, e ai nomi delle classi specifiche, e degl'individui[27] per facilitarne maggiormente l'intelligenza; i caratteri degli aggettivi, e degli avverbj esprimenti il comparativo, il superlativo, il diminutivo, l'aumentativo, ec.; i caratteri degli avverbj di tempo indicanti i diversi tempi dei verbi, e dei participj; e tutti quegli altri, che concorrono a formare una sola nozione, e che parlando esprimer potrebbonsi con una sola parola. Quanto ai punti, alle virgole, alle parentesi, ec. tutte s'avrebbono a segnare alla maniera ordinaria.

Da questo piano succinto voi potete argomentar di leggieri quanto una lingua caratteristica sarebbe facile a formare, e quanto facile pur sarebbe ad apprendersi inventata che fosse. Qui non avreste inflessioni dei nomi, e di verbi, che in alcune lingue, e nella Greca specialmente, sono ai principianti di tanta pena; qui non l'ammasso ordinario di regole, e d'eccezioni, che agguaglian talvolta le regole generali; non avreste qui a contorcervi il viso e la bocca per addestrarvi ad una pronunzia, a cui gli organi già indurati talor ricusano di prestarsi.

Banditi sarebbono i sinonimi, che accrescendo il numero dei vocaboli accrescono la difficoltà d'impararli, le idee analoghe con segni analoghi vedreste espresse, non già con termini diversi affatto, siccome avviene in quasi tutte le lingue; gli aggettivi, gli avverbj, e i verbi, i

troviĝantaj apekse, per kiuj oni indikas la potencojn en algebro. Facile troveblas literoj.

Nun, al ni restas la tasko, indiki kiamaniere ni surpaperigos la terminojn. Laŭ mi, por eviti konfuzon, oni skribu ĉiun vorton separite, same kiel ni skribas separite ankaŭ la alfabetajn literojn, kiuj konsistigas vorton. Kungrupite, ekzistas nur la litergrupoj aŭ la ikonoj, kiuj sekvas la kategori-indikan prefikson. Ĉi-lastajn ni skribas antaŭ la propraj nomoj, antaŭ la semantikaj klasig-signoj, kaj antaŭ la individuaj nomoj[27], por faciligi la komprenon. La samo valida por la "konstantaj signoj", kreantaj adjektivojn kaj adverbojn, kiam ĉi-lastaj troviĝas en kompar-formo, en superlativa formo, en etig-formo, en egig-formo. La samo koncernas la kategori-litersignojn de la temp-adverboj, kiuj indikas ĝiajn tensojn, kaj tiujn de la participoj. La ceteraj funkciaj konstantaj litersignoj formas unu solan nocion kun la baza semantika litersigno aŭ ikono, kiun ni konsiderus kvazaŭ "vorto", se nia lingvo estus parolebla. Rilate la punktojn, la komojn, la parentezojn, ktp, ni skribos ilin laŭ nia hodiaŭa kutimo.

Dank-al ĉi tiu konciza plano, vi observas, kiom simple ni povus konstrui kategori-klasigan lingvon, kaj kiom facile estus lerni ĝin, danke al tiu metodo. Vi ne trovus deklinaciojn kaj konjugaciojn, kiuj en iuj lingvoj, kaj precipe en la greka, estas tiel penigaj por komencantoj. Vi ne trovos la kutiman listo de reguloj, kaj de esceptoj, kiuj aspektas kvazaŭ ĝeneralaj reguloj. En tiu lingvo via lango, via buŝo kaj via vizaĝo ne devos peme trejniĝi al korekta elparolo, al kiu maljuniĝantaj parol-organoj kelkfoje rifuzas sin nove alkutimiĝi.

La sinonimoj forestus. Ili ja grandigas la kvanton da vortoj lernotaj, kaj tial ili grandigas la malfacilon lerni lingvon. Ekzistas ja sence analogaj nocioj, sed ili esprimiĝas per similaj litersignoj aŭ ikonoj, kaj ne per tute aliaformaj terminoj, kiel okazas en preskaŭ ĉiuj aliaj

[27] Il testo è poco chiaro, e nel corso del capitolo lo diventa sempre meno. Probabilmente è un riassunto.
[27] *La teksto estas malklara, kaj ĝi ankoraŭ plie malklariĝos. Supozeble, temas pri resumo.*

participj, che dipendono da un sostantivo medesimo, o che esprimono le diverse modificazioni d’una medesima idea, vi si offrirebbono con uno stesso carattere, sicché appresi i sostantivi, voi già sapreste pur tutto il resto; i caratteri delle idee positive colla distinzione d‘un picciol segno costante, vi farebbon conoscere ancora le negative, le contrarie, e quelle che seco hanno le relazioni almen più intime o di somiglianza, o di coesistenza, o di dipendenza; per l’uso, regola dei segni costanti, alla prima occhiata ravvisereste a qual parte del discorso ciascun carattere si riferisca, il che non è da dire quanto gioverebbe a facilitare l’intelligenza dei loro significati; coll’uso de’ caratteri universali premessi ai nomi specifici, ed individuali, voi potreste distinguere incontanente a qual classe ogni nome appartenga, il che pur basterebbe sovente a farvi indovinare l’oggetto da lui espresso; sopra tutto i caratteri imitativi vi offrirebbero gli oggetti stessi sott’occhio, talché il vederli, e l’intenderli non sarebbe che un atto solo. In qual lingua del mondo sapreste voi ritrovare un’egual facilità?

lingvoj. La adjektivoj, la adverboj, la verboj, la participoj, kiuj venas de la sama substantivo, aŭ kiuj esprimas diversajn modifojn de la sama nocio, estus troveblaj kun la sama baza karaktero. Se vi lernis la substantivojn, vi jam kapablus rekoni iliajn derivaĵojn. La karakteroj indikantaj nocion pozitivan, per eta konstanta signo, kondukas vin al la neada, al la kontraŭa terminoj, kaj al tiuj terminoj, kiuj havas ian sencan rilaton kun la origina nocio, sur la bazo de simileco, de kun-ekzisto, aŭ de dependo. Danke al la uzo de konstantaj signoj, vi rekonus tuj, kiu estas la funkcio de la termino, kaj al kiu alia vorto ĝi rilatas. Tio ege faciligus la komprenon de la signifoj. Danke al la uzo de la kategori-klasigaj litersignoj, antaŭantaj specifajn kaj personajn nomojn, vi povus tuj rekoni, al kiu koncepto-kategorio ĝi apartenas. Tio ĝenerale sufiĉas por kompreni pri kio temas. Ĉefe se la ikono estas form-imita, ilin rigardi kaj kompreni la senco-kampon, estus rapidega afero. En kiu lingvo tio estus pli facila?

Dunque, direte voi, tutta la ragione io avrò d’occuparmivi, e di procurare che questa lingua realmente si istituisca, e si renda universale.

Vi nun eble opinias, ke estus tre utile okupiĝi pri tiu temo, kaj, tial, klopodi, por ke ĝi fakte io tia konstruiĝu, kaj estu enirigata en la uzon universalan.

Voi avreste, rispondo io, un grandissimo torto, e perché una nuova lingua qualunque è impossibile ad introdursi universalmente, e perché quand'anche possibil fosse, per l’oggetto che si ha di mira sarebbe inutilissimo il pensare a una nuova lingua. Lascio la difficoltà di recarla fra i popoli dell'Asia, dell’Africa, e dell’America, a’ quali pure per essere universale dovrebbe farsi comune. Qual commercio letterario, direte voi, abbiamo noi coi Tartari, cogli Abissini, e cogli Huroni, onde importare ci debba, che la nostra lingua da loro venga accettata?

Sed, bedaŭrinde, laŭ mia opinio, vi ege erarus. Ĉar estas neeble universale enuzigi novan lingvon. Eĉ se la konstruo de tia nova lingvo montriĝus ebla, la celo aspektas neatingebla. Mi ne aludas, principe, al la malfacilo instrui ĝin al la aziaj, afrikaj kaj amerikaj popoloj, kiuj ankaŭ devus partopreni al la universaleco de tiu lingvo. Ĉar ne havas multajn rilatoj kun Tartaroj, Etiopianoj, kaj Huronoj. Kial, por ili, tia lingvo povus esti utila? Kio kredigas nin, ke por ni estus avantaĝe, ke ili lernu ĝin?

Or bene, restringiamoci pur soltanto all’Europa. Il maggior vantaggio di una lingua universale sarebbe adunque il far sì, che le opere letterarie, di cui le stampe Europee ci

Ni do koncentrigu nian atenton nur pri Eŭropo. La plej granda avantaĝo de universala lingvo estus la ebleco, legi kaj kompreni la literaturajn verkojn, kiuj atingas nin el-de ĉiu angulo de

inondano da ogni parte, fossero intese da tutti universalmente. Il vantaggio sarebbe grandissimo senza dubbio.

Eŭropo. Sendube, temus pri tre granda avantaĝo.

Ma a ciò richiederebbesi, che tutte le opere letterarie quindi innanzi in una tal lingua fossero scritte, e che in quella si trasportassero tutte le scritte e pubblicate finora; altrimenti finché l'Italiano vorrà pur seguitare a valersi della sua lingua, della sua il Francese, lo Spagnuolo, l'Inglese, il Tedesco, ec. pur della loro, voi non avrete fatto che introdurre una lingua di più, e lo sconcerto sarà peggiore.

Sed tio postulas, ke tiuj verkoj skribiĝu ja precize en *tiu* lingvo, kaj ke en tiun lingvon oni traduku ĉiujn ĝisnun aperintajn librojn. Sed se la Italoj volus daŭre utiligi sian lingvon, kaj same decidus la Francoj, la Hispanoj, la Angloj, la Germanoj, ktp., jen la nedezirata konsekvenco: vi nur aldonis novan lingvon. Avantaĝo fariĝas malavantaĝo. La "solvo" kaŭzus kroman problemon.

Ma come sperate voi, che tutti debbano rinunziare concordemente al piacere, che sempre più va crescendo, di scrivere nella propria lingua? E se indurre mai si potessero ad una tal rinunzia, se tutti unirsi potessero di concerto a non più usare che una lingua comune, qual bisogno v'avrebbe egli d'inventarne una nuova?

Estas sensence esperi, ke ĉiuj konsente decidos rezigni al la daŭre kreskanta plezuro verki en la propra lingvo. Kaj se oni ja povus persvadi ĉiujn, rezigni je propra lingvo, kaj uzi nur la komunan lingvon, kial estus necese elpensi tute novan?

Non abbiam forse a tal uopo la lingua latina, lingua che ogni uom di lettere è costretto ad apprendere dalla più tenera fanciullezza, lingua per conseguenza già a tutti nota? che una lingua istituita di nuovo, e meno ancora una lingua semplicemente caratteristica, abbia da tutti a praticarsi, poiché si trascura quella, che già per sé stessa già da tutti è conosciuta; né quale utilità dall'istituire a tal uopo una nuova lingua venir potrebbe, quando n'abbiamo già una in pronto, che ugualmente, e più ancora al proposto oggetto sarebbe opportuna: perciocché finalmente, se ne traete il vantaggio, che i libri con una lingua caratteristica scemerebbon di mole, il quale vantaggio non so se troppo animerebbe gli Stampatori a promoverla, per tutto altro certamente ella non è da paragonare ad una lingua, che al tempo stesso scriver si possa, e parlare. Il consiglio migliore pertanto ch'io vi possa proporre egli è quello d'abbandonarne il pensiero, e di volgervi ad altra impresa più utile; che ben molte ne sono, le quali a gara occupar vorranno i vostri studj e le vostre ricerche.

Ĉiuj scias, ke, kiel komuna lingvo, ni jam havas la latinan, kiun ĉiu klerulo lernas jam jun-aĝe, kaj kiu, pro tio, estas vaste konata. Nove ellaborita lingvo, nur skribata kaj kategori-klasiga, ne estos vaste utiligata, kaj ne forgesigos la lingvon, kiun ni jam konas, kaj kiu jam utilis al tiu universala celo. Nova lingvo, do, finfine, aspektas io tute ne necesa.

Krome, eble, per tiu lingvo vi ricevas la avantaĝon, ke la libroj fariĝus malpli dikaj, se skribataj en kategori-klasiga lingvo. Sed tio certe ne estas bona argomento por motivi la eldonistojn favori ĝin. Fakte, la kategori-klasiga lingvo ne estas komparebla al vera lingvo, kiun oni ja povas skribi, kaj samtempe ankaŭ paroli. La plej amika konsilo, kiun mi donos al vi, estas, ke vi forlasu ĉi tiun projekton, kaj ke vi turniĝu al io pli utila. Multaj aliaj utilaj projektoj ekzistas: al ili vi povas direkti viajn studojn kaj viajn esplorojn.

Piacciavi di gradire la sincerità dei miei sentimenti, e d'amare chi sarà sempre con vero animo. ec.

Bonvolu akcepti la esprimon de miaj sinceraj sentoj, kaj restu amika al mia sincereco.